

ESPERANTO

sub la suda kruco

junio 2019





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

**OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Volumo 26[2] numero 135 junio 2019

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktistoj: Terry Manley, Joanne Johns

Provlegantoj: Vera Payne, Donald Rogers

Kontaktadreso: esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: www.esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEA: www.esperanto.org.au / exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-an de aŭgusto 2019

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2019 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.

SUR LA KOVRILO: Blanka urso

ENHAVO

Kvar plenplenaj tagoj en Esperantujo	04
Koimbra kaj Fado	06
Vizito al Flandra Esperanto-Ligo	09
Margaret Chaldecott 1926-2019	10
Eunice Graham 1919-2019	13
AEA Aferoj	15
Berlinaj muroj en Belfast	16
Pri Leonardo da Vinci	19
Recenzo: Amo inter Ruinoj	20
La Limo de Memoro	21
Hamilton: iam forgesita urbo	24
Saga Land	25
Misaj modeloj de la angla gramatiko	27

Kvar plenplenaj tagoj en Esperantujo

TERRY MANLEY (ARMIDALE)

Mi alvenis Esperantodomen marde vespere 23an de Aprilo kaj renkontis Franciska, kiu ankaŭ venis helpi pri la arkivo en Esperanto domo. Post iom da babilado ni iris butikumi kaj reirinte al la klubo ni vespermanĝis. Dmitri lasis por mi matracon kaj littukojn sur la unua etaĝo kie mi dormis. Estis agrable aŭskulti la fluan, klaran voĉon de Franciska kaj havi ŝancon konversacii vidalvide, kio mankas al mi en Armidale.



Je merkreda mateno alvenis Sandor, Jonathan, kaj Heather kun sia nepino Elizabeth. Do estis sesopo de ni por plenigi la spacon kaj prilabori la arkivon. Post nelonga kunveno (vidu apartan raporton) ni eklaboris. Mi skribas "ek" sed tuj estis hezito, konstatante kiom da laboro alfrontis nin por klasifiki, ordigi, elskatoligi, skani, registri, ktp la enhavon de la ĉambro. Sed decidante ke vojaĝo de mil paŝoj komencas per la unua paŝo, ni komencis.

Heather kaj Franciska koncentriĝis pri surbretigo laŭorda de la jam numeritaj libroj. Kaj ili ja daŭrigis tion dum tri tagoj ĉar estis tiom da libroj. Mi gratulas ilin pro tia klopoda fokuso, sen kiu la tasko restus neplenumita. Je la unua tago Sandor kaj Jonathan esploris skatolojn kiuj enhavis aŭstraliaĵojn, specife fotojn. Ili ankaŭ diskutis pri la sistemo ordigi librojn. Ĉar aliaj jam komencis per la Dewey-sistemo ni konsentis daŭrigi tiel. Estas kaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj por tiu sistemo en la kazoj de specialaj kolektoj. La esperanta kolekto estas tiel ordigita kvazaŭ Esperantujo estas aparta lando, do ne kiel en normala aŭstralia biblioteko.

Je 14:30 ni iris al la ŝtata artgalerio. Per *Meetup* Jonathan organizis gvidi grupon dum unu horo je 15:00. Nia grupo kaj kvar aliaj - James, Doris, Helen kaj Dmitri renkontiĝis por la afero. Jonathan montris al ni kelkajn pentraĵojn el la kolekto kaj klarigis kiel oni povas vidi eĥojn de kaj formoj kaj koloroj en iuj pentraĵoj. Li ankaŭ montris la uzon de la "ora proporcio" age de iu pentristo. Kvin el ni decidis resti por plurigardi pentraĵojn kaj spekti filmon. La filmo estis "A Touch of Zen" (Nuanco da Zeno) el Tajlando, 1971.

Je ĵaŭdo alvenis al E-domo ankaŭ Alan Turvey. Refoje Heather, Franciska kaj mi daŭrigis la surbretigon de libroj, dum Sandor, Alan kaj Jonathan fotis, enkomputiligis kaj registris fotojn el la skatoloj. Mi sentas ke la laboro estas kiel memgvidata kurso dum kiu ni lernis pri la Dewey-sistemo, pri kiom da libroj okupas ĉiun kategorion, kaj krome, kiel ade laboris Esperantistoj por krei tiun literaturon kaj originalan kaj tradukitan, inkluzive la fakajn librojn. Iuj lernis kiel plej bone utiligi poŝtelefonon for foti aferojn. Ni lernis pri iuj trezoroj de nia kolekto, pri unuaj eldonoj kaj raraĵoj.

En la vespero de ĵaŭdo, kvar el ni - Heather, Sandor, Franciska kaj mi - iris renkonti

Daniel Kane en Epping por vespermanĝi ĉe picejo. Estis vespero de bonhumora babilado rememorante la pasintecon kaj sciiĝante pri intertempaj okazoj.

Vendrede, ses el ni (Elizabeth, la nepino de Heather revenis) laboris pri la arkivo. El la suba ĉambro ŝvebis dolĉaj kantoj de rusa kantgrupo, kiu alvenis por sin ekzerci. Antaŭ ol komenci ni havis ŝancon viziti la atelieron, malantaŭ E-domo, kaj la artistojn kiuj laboras en ĝi. Hugh luis la ejon de la EFNSK ekde 1995 kaj sufiĉe sukcesis por daŭre labori tie. Li arigis komunumon de lokaj artistoj kaj la etoso estas vigla kaj ege interesa por ni.

Poste ni sukcesis pri la enmeto de preskaŭ ĉiuj libroj kun numeroj sur bretojn kaj multe da fotado. Komenciĝis ankaŭ la ordigado de iuj esperantaj specialaĵoj kiel UEA aferoj: jarlibroj, kongreslibroj ks. Ni deziras agnoski la laboron de tiuj kiuj antaŭe prizorgis la arkivon. Ralph Harry, Peter Hai, Hugh Malcolm bezonas specialajn menciojn. Multaj el la gazetoj binditaj estas jam surbretaj danke al Hugh.

Je 15:00 ni kunvenis kaj montris kion ni individue faris kaj refoje resumis pri la celoj de la grupo kaj diskutis planon kiel daŭrigi la laboron. Post 16:00 multaj infanoj rusaj alvenis al la klubo por pentri kaj fari aliajn artaĵojn rilate al ties kulturo. Estis bone rimarki ke la klubo vere vivas per la etendigo al alikulturaj grupoj. En la vespero mi kaj Franciska marŝis al Newtown (Niutaŭn) kie ni manĝis en restoracio kun Tajlanda manĝaĵo. Hazarde ni reenkontis Heather kaj Elizabeth surstrate.

Sabaton mi frue iris al Manlia plaĝo kie mi ĝoje ludnaĝis en klaraj, glatformaj ondoj. Poste mi renkontis Roger Springer, Sandor kaj Franciska ĉe la Bavaria kafejo. Ne estis kutima sabato por tio, do ni dankas al Roger por alveni renkonti nin kaj por la trinkaĵo. Roger alportis fotoalbumojn de Eunice Graham por doni al la arkivo. Sandor kaj mi adiaŭis ĉar ni iris al lingva festivalo en Gordon, kiun Dmitri organizis. Estis tre amika okazo de ĉ. 20 partoprenantoj. Ni lernis iomete pri la Tamila, Hinda, Araba, Taguta (inta lingvo apud Mongolio), Nederlanda, kaj lingvo de negranda grupo en rusujo. Dmitri prezentis tiun lastan. Ankaŭ Sandor prezentis pri Esperanto.

Alveninte al E-domo per la aŭto de Dmitri mi estis preta iom ripozi, sed la klubo estis tiel aktiva ke ne eblis. En la korto estis grupo da aktoroj kaj helpantoj kiuj faris filmon en la ateliero. Ili manĝis kaj babilis. Dmitri, kun amiko Sam, gvidis grupon, ĉe la unua etaĝo, kiu ludis ŝakon. Mi enrigardis kaj estis 10-12 da tiuj. En la salono sube Richard Delamore instruis Esperanton al 12 junuloj. Vigle li regaligis ilin pri la reguloj de la bona lingvo.

Mi cedis al la sento iom malaktivi kaj lasis la ŝakamantojn kaj junulojn al ties okupoj. Mi promenis kun Sandor al sia loĝloko trans la tereno de la universitato. Estis pli trankvilige inter la imponaj sabloŝtonaj konstruaĵoj kun belaj pordarkoj kaj kortoj sen la senĉesa preterpaso de aŭtaro.

Reveninte al la klubo mi trovis ĝin kvietita. Nur restis duopo silente luktanta en la lasta ŝakludo.

Bonan nokton.

Koimbra kaj Fado

**HEATHER HELDZINGEN
(MELBOURNO)**

Kiam mi partoprenis en la Universala Kongreso en Lisbono pasintan Julion mi vizitis restoracion kie portugala Esperanto-amiko kune kun aliaj el la LKK ludis Fadon, specife la faman Koimbran kantstilon. Post la kongreso mi vizitis la belan urbon Koimbro kaj dufoje vizitis restoracion por reaŭdi Fadon.

Koimbro (portugale Coimbra) estas urbo en centra Portugalujo. Ĝi troviĝas en la Centra regiono kaj subregiono de Malsupra Montego kaj havas 107 milojn da loĝantoj.

Ĉirkaŭ 200 km for de Lisbono kaj 100 km for de Porto, la urbo estis nacia ĉefurbo de kulturo en 2003. Iama ĉefurbo





de la lando, ĝi estas hejmo al konservita, mezepoka, malnova urbo kaj la historia Universitato de Koimbro.

Konstruita sur la tereno de eksa palaco, la universitato estas fama pro ĝia baroka biblioteko, la Biblioteko Joanina, kaj ĝia 18-a jarcenta sonorilturo.

La Universitato de Koimbro estis fondata de la reĝo Don Denizo, la 1-an de Marto 1290, kiam li subskribis la dokumenton titolitan "Scientiae thesaurus mirabilis", kreante la Universitaton de Lisbono. La buleo de la papo Nikolao la 4-a, datita de la 9-a de Aŭgusto 1290, agnoskis la Ĝeneralan Studon, prezentante la fakultatojn pri artoj, kanona juro, civila juro, medicino kaj teologio.

La universitato, komence estis instalita en la nuna Largo do Karmo, en Lisbono, kie ĝi restis ĝis 1354, kaj en tiu jaro ĝi estis translokita al Koimbro. Ĝi restis en ĉi tiu urbo ĝis 1377, kaj ree instaligis en Lisbono en tiu jaro. Ĝi restis en Lisbono ĝis 1537, dato kiam ĝi estis definitive translokita al Koimbro, laŭ ordono de la reĝo Johano la 3-a.



Fado estas tradicia kantstilo, kiun plenumas solkantisto (vira aŭ ina) kun gitara akompano. La temoj kaj tono estas plejofte melankoliaj (tial la signifo, "fato"), kvankam ne mankas leĝeraj kaj eĉ humuraj ĝenroj. Fado, estis agnoskita de Unesko en la jaro 2011 kiel nemateria kultura heredaĵo.

En Portugalujo ĝi estas depost kelkaj jardekoj ĝenerale prezata kaj prestiĝa kantarto, kvankam ĝi plene konserviĝas ankaŭ kiel popola fenomeno, daŭre kantata en malriĉaj drinkejoj. Kutima prezentaĵo ankaŭ en luksaj drinkejoj kaj restoracioj, kune kun manĝaĵoj kaj bonaj vinoj, Fado estas unu el la ĉefaj "porturistaj tipaĵoj". Tamen Fado okupas specialan lokon en la vivo de preskaŭ ĉiu portugalo, kiu sincere kunsentas la ĉargrenon, melankolion, gajecon kaj tion temas la muzikon.

Fado ekestis ĉirkaŭ 1820. Estas pluraj hipotezoj pri ĝia apero, sed neniu plene akceptita teorio. Plej verŝajne estis la influo de koloniaj enmigrintoj kaj revenantaj elmigrintoj, kiuj alportis elementojn afrikajn kaj brazilajn; lokaj influoj, nome de ciganaj romancoj kaj flamenko.

Ĝenerale en fado-muziko, la kantisto kantas pri la malfacilaj realaĵoj de la ĉiutaga vivo, ekvilibrigante ambaŭ rezignon kaj esperon, por ke rezolucio al ĝiaj turmentoj ankoraŭ povu okazi. Ĝi povas esti priskribita per uzado de la portugala vorto "saudado", kiu signifas "sopiron" kaj staras pro sento de perdo.

Post iom kriza periodo en la jaroj 1970-aj, kiam la Fado ekmalpopulariĝis inter la junuloj, ĝi estas nuntempe pli populara ol verŝajne iam ajn, perdinte la fifamecon kiun ĝi ĝuis ĝis ĉ. la mezo de la 20 jarcento (la vorto "fadista" estis eĉ uzata neformale



en "decaĵ" rondoj kiel sinonimo de "vagabondo" aŭ eĉ "stratkrimulo").

Estas du ĉefaj fadstiloj, Lisbona kaj Coimbra. Ĉilasta evoluis el la unua kaj ĝin kantas universitataj studentoj, ĉefe pri amaj temoj kaj preskaŭ ĉiam malgaje.

Lisbona Fado estas la plej konata el la du stiloj. Ĝi trovis sian lokon en hejmoj tra Portugalujo. Por aplaŭdi Fadon en Lisbono, vi devas bati viajn manojn.

Koimbra fado havas ligojn al akademias tradicioj de la Universitato de Coimbra. La kantistoj kaj aliaj muzikistoj portas la tradician akademian vestaron, kiu konsistas el malhelaj ŝuoj kaj ĉapeloj. Ili kantas ĉi tiun fadon nokte sur la stratoj aŭ en la urbeta kvadrato. Dum Lisbona ofte plaĉas al tiuj en la laborejaj kampoj, Coimbra allogas la pli privilegiajn klasojn.

Ekzistas kelkaj aliaj diferencoj inter Lisbona kaj Coimbra. Lisbona Fado povas esti kantata de iu ajn sendepende de sekso, dum Coimbra estas kantata sole de viroj. Coimbra Fado ĝenerale klopodas trovi esperon en la ĉiutagaj malfacilaĵoj, kiujn homoj travivas. Kontraŭe, Lisbona fado sugestus kapitulacadon alfrontante tiujn malfacilecojn.

Vizito al la Flandra Esperanto-Ligo

DAVID RYAN (WELLINGTON)



En februaro 2019 mi vizitis la oficejon de la Flandra Esperanto-Ligo en Antverpeno, Belgio, kie mi aĉetis kelkajn librojn. La oficejo troviĝas en la urbcentro.

La Liga libroservo havas grandan stokon da libroj kaj aliaj Esperantaĵoj (parto aperas en la foto kun la oficistino, Gerd Jacques).

Ankaŭ eblas mendi rete:
https://www.esperanto.be/cgi-bin/mal/Web_store/web_storeie.cgi.



Margaret Chaldecott 1926–2019

Margaret Chaldecott forpasis la 25an de Marto 2019. Sekvas la nekrologo verkita de Jennifer Hocking, nevino de Margaret. La funebra Diservo okazis la 4an de Aprilo.

Eulogy for Margaret Chaldecott – 4th April 2019
Jennifer Hocking

Bonan matenon. Good morning.

Aunty Margaret was born on the 23rd June 1926 at Northbridge, Sydney. She was the first born and eldest daughter of Francis Morton and Sydney Clare Hocking. Margaret, or Maggy as she was sometimes called, had a brother John (my father) and a sister, Jennifer. Due to Jennifer's ill health as a child, the doctors recommended that they move to a suburb more suitable for her health and it was for this reason that they moved to Lindfield in 1939. This became and remained the family home until 2013.

Margaret was academically gifted and earned a place in Hornsby Girls' Selective High School. Unfortunately, the Second World War interfered with her education and she was unable to pursue tertiary studies. She had a very sharp analytical mind, was an avid reader and interested in a wide variety of political and social issues. Her views were often expressed in an emphatic and compelling manner. She regularly wrote letters to the editor and was often published in Column 8 on the front page of the Sydney Morning Herald. I remember many occasions growing up watching Dad working in his garage when suddenly, he would get excited as he had just heard Aunty Margaret live on talk-back radio.

After the war she undertook clerical work and then decided to travel abroad and work as a stenographer in Europe. This began her love of travelling. She stayed overseas for more than 15 years. In the meantime, her sister Jennifer had moved to London to work and the two of them formed a close bond which lasted a lifetime. Whenever possible, Margaret visited Jennifer, when she was en-route to different destinations.

After the war her parents, Clare and Silas, loved going to the All Nations Club Dance evenings and Margaret loved to accompany them. The photo on the back of the Order of Service shows her sheer delight and joy dancing with her father with whom she had a special bond.



Margaret learnt Esperanto in London. An international language created to bridge the gap between different language communities. Not many people know about it. She was extremely fluent in speaking this language. She was a member since 1964 and stayed connected with the Sydney branch until she could no longer travel into Surrey Hills or Redfern for the meetings. She held many positions including being President and Secretary of the Sydney Esperanto Society from as early as 1964. She was editor of the NSW magazine 'Telopeo'. She also looked after the accounts in the office 1 day a week. She was a delegate of the Universal Esperanto Association for many years, being listed in the yearbook in 1979 and still in 2005. As a delegate she welcomed travelling Esperanto speakers into her home. She too travelled both within Australia to Congresses and Summer Schools and overseas to participate in Esperanto events and visit fellow speakers. She often did the secretarial work of the Esperanto Federation partly because of her excellent shorthand. She won the 2008 NSW volunteer of the year award. She was made a life member. Esperanto was a passion that she never lost. If you rang her home phone she spoke in both English and Esperanto. This interest led Margaret to making strong friendships with people in Sri Lanka and particularly Cuba. She made at least three trips to Cuba to both immerse herself in the Esperanto world there and to teach knitting. We remember one trip she took to Cuba where she boarded the plane dressed in many layers of clothing that she could remove and leave there for the people who were in great need, plus the extra that she carried in her luggage. Margaret was also in the SES.

Another skill that Margaret developed was her ability to knit intricate patterns. She could look at a design and work out the pattern by trial and error. Dad remembers her travelling on the train, knitting an involved pattern and reading her book at the same time. Amazing skill. Margaret published knitting articles in the Women's Weekly in 1941, 42, and 43. She was an active teacher on knitting forums, and published knitting patterns in both English and Esperanto. She could knit a gusset, do double sided knitting, and knit 2 socks at once. In retirement Margaret spent many years teaching knitting at the Sydney Lyceum and in Chatswood.

Perhaps something that gave Margaret much joy was her love of dogs. The Hocking family were certainly all dog lovers and Margaret was affectionately known by many around Lindfield as 'the lady with the dog'. She walked her dog every day, speaking with all and sundry, and loving the joy of sharing her life with other dog lovers she met up the street. All her dogs were 'rescue dogs' who needed that extra love and attention.

Shortly after the war Margaret lost her confidence in a slight car accident which deterred her from ever obtaining her driving licence. Instead she became very proficient at using public transport. Having travelled in Europe in her younger days, she was always able to navigate the world using public transport to a high degree of efficiency. She could read and understand train and bus timetables and work out exactly where and how to travel at the lowest cost.

In her 40's she met and married Pat. They bought a house in Grosvenor Road Lindfield, one street back from her parents. They had no children. After Pat died,

she remained in the home until her late eighties. Together, they decided to become vegetarians and linked up with the Chatswood Seventh Day Adventist Church.

Margaret was very environmentally conscious, long before it became trendy. My sister and I remember going to her house in primary school and Coles bags were hanging on the line drying because she had washed them to reuse them. There was another time she rang Dad because the school had thrown out dozens of eggs, and she wanted us to go and get them and eat them!

Margaret was a proud volunteer at the Sydney Olympics. She never threw out the uniform and wore that blue branded raincoat and T-shirt everywhere for many years after.

Margaret became a committed and loyal member of the Church, attending weekly Sabbath services and associated activities. Within the church family she made some close friends and enjoyed being in this community while she was able to attend.

Margaret's health declined in the last few years. More recently she had a stroke which affected her right side and led to her needing full care. It was for this reason she was moved to Tallwood's Aged Care at Wahroonga where she was well looked after. A special thank you to Sister Jenny and her staff. Her confinement was something Margaret did not like and found difficult to accept as she had always been able to come and go at will. Although her body weakened, her mind remained sharp to the end.

Her long life of 92 years was well lived. She was an independent, free thinking woman with strong views who never hesitated to express them. Her love of travelling opened new horizons and she used her talents to enrich her life and others she met through Esperanto and Knitting. Both her brother John and sister Jennifer predeceased her.

It is our prayer that she now has peace in her mind, love in her heart, and in accordance with her Christian beliefs that she is reunited with those whom she loved. May there be much rejoicing in heaven.



Eunice Graham 1919–2019

TERRY MANLEY (ARMIDALE)



Mi ne povis ĉeesti la funebran ceremonion de Eunice, do petis al Jane kaj Geoffrey, la gefiloj de Eunice, ĉu ili povos sendi al mi informon pri ĝi. Jane promesis sendi al mi siajn notojn pri la servo. Geoffrey sendis al mi ligon al filmo de la ceremonio. Tiel mi povis spekti ĝin kaj aŭskulti la biografiojn liveritajn de ili kaj la enkondukinton. Jen mia resumo - sed se vi preferas vi povos spekti ĝin ĉe https://geoffg.net/temp/Eunice_Graham_Funeral.mp4

La sekvo estas kompilita el paroloj de: estrino ĉe la fleghejmo kie Eunice loĝis; filino Jane; kaj filo Graham kiu legis leteron senditan de Melanie, sia filino. Ankaŭ intermiksiĝas iuj de miaj memoroj.

Eunice naskiĝis monaton post la fino de la unua mondmilito en Anglujo. Kiel infano Eunice suferis pro reŭmata febro. Kvankam ŝi atingis la grandan aĝon de cent jaroj ŝia vivo ne estis sen sanproblemoj. Eunice plenkresis en epoko kaj kulturo kie la knabinoj ne havis tiajn ŝancojn kaj edukajn kaj laborajn kiel la knaboj. Malgraŭ tio Eunice elstaris en sia lernejo, Cardiff gimnazio, kie ŝi gajnis stipendion.

La patro de Eunice, W Branson estis klerulo kun intereso en literaturo, opero kaj maldekstraj politikaj aferoj. Profesie li estis inventisto elektronika. Li inventis aparaton por forigi la flagretecon el filmoj. Pro la granda financfiasko de la 1930aj jaroj lia entrepreno malsukcesis kaj la edukado de Eunice ĉesis.

Ĉe la patrino de Eunice estis iom male ol ĉe la patro. Ŝi nomis siajn ses infanojn, muknazaj orfoj. Ŝi forte pianoludis, certe ne operostile. Verŝajne Eunice heredis sian bonhumuron de ŝi.

Eunice travivis la bombadon de Londono dum la dua mondmilito. Lufoje bombo trafis apartamenton sub la ŝian. Ŝia edziniĝo estis inter cirkonstancoj de tiu milito.

Jane rakontis ke post sia naskiĝo, Eunice suferis pro tiroida problemo. Oni kuracis ĝin per radiuma trinkaĵo!

Eunice laboris por la Royal Far West (Reĝa Fora Okcidento) organizo en Manlio.

Ĝi estis organizo kiu prizorgis la sanon kaj oportunojn de infanoj el la okcidenta regiono de NSK. La infanoj povas ricevi kuracadon aŭ apudmaran ferion pere de tiu organizo.

Per tiu laboro ŝi sukcesis aĉeti familian domon kiun ŝi bontenadis ene kaj ekstere. La ĝardeno estis bonege prizorgita kun multaj floroj kaj de ĝi oni havis belan rigardon al la haveno. Oni memoras ŝin pro ŝia varme bonveniga karaktero. Ŝi ofte okazigis festojn por najbaroj kaj esperantistoj kaj ofte gastigis vojaĝantojn.

Post ŝia emeritiĝo Eunice volontulis ĉe la naturprotektita centro en Manlio. Dum dek kvin jaroj ŝi prizorgis ties libraron kaj legaĵojn. Tri foje ŝi ricevis premion de la loka registaro kiel Volontulo de la Jaro pro tia laboro.

Kiel okdekjarulo la vidpovo de Eunice malboniĝis kaj ŝi ne plu povis volontuli tiel.

Melanie, nepino de Eunice, memoras ŝin kiel pripensema, donacema avinjo kun malnova angla etiko. Ŝi ĉiam perfekte tualetigis sin kaj same perfekte prizorgis la ĉambrojn en la domo.

Ĉiam plena de vivoĝojo, Eunice amis vojaĝi, amis legi, amis bonhumoron, amis sian familion kaj komunumon.

En la fleghejmon studentinoj de loka gimnazio venis por intervjui loĝantojn kaj miris je la juneco kaj klarmemoro de Eunice kiel 99-jarulo. Unu el ŝiaj memoroj pri sia lernejo estis la poluritaj plankoj. Oni devis ŝanĝi la ŝuojn antaŭ ol eniri. Ŝi ankaŭ povis deklami poemojn kaj rakontojn de sia juneco. *Invictus* kaj *The Lady of Shalot* estis du el ŝiaj plej ŝatataj. Kiel knabino ŝia plej ŝatata romano estis *Ann of Green Gables* kaj ŝia plej ŝatata himno estis *Be Still*

My Soul.

Eunice interesiĝis pri ĉio ĉirkaŭ si. Ĉu pri la naturo aŭ pri ŝtalfarejo en Anglujo ŝi interesiĝis. Ŝi faris la kriptajn krucenigmojn en la ĵurnaloj kaj preskaŭ ĉiam sukcesis pri la tuto.

Eunice amegis Esperanton kaj ties filozofion. Ŝi forte laboris por la movado, gastigante vizitantojn, instruante, kaj plej grave ĝuegante la E-rondojn en Manlio, Sidnejo, tra Aŭstralio kaj en kongresoj eksterlandaj. Ŝi ofte ludrolis en teatraĵetojn plejofte humurajn.

Rido estis por ŝi natura. Per Esperanto Eunice helpis japanan familion (Yoko Isobe, edzon kaj filinon Mayo) trovi loĝlokon por lui en Sidnejo kaj lernejlokon por Mayo. Mayo nun estas anglalingva ĵurnalisto en Japanujo. La plej elstara memoro por Jane estis la ridado de Yoko kaj Eunice kiam ili ŝercis Esperante.

Unu monaton antaŭ ŝia forpaso Eunice iris al la Esperanta renkontiĝo ĉe la Bavaria kafejo. Ŝi faris tion dum jaroj kaj malgraŭ sia doloro ŝi ankoraŭ faris preskaŭ ĝis la fino, danke al John kiu veturigis ŝin tien.

Resume: Ĉiuj memoris Eunice kiel ĝojplena kaj amema homo kun intereso en ĉio kaj ĉiu kiun ŝi renkontis. Familianoj de Eunice: Pam - fratino; Geoff - filo; Jane - filino; Melanie kaj Jeremy - genepoj; kaj pranepoj Kai kaj Bo sentas la mankon de sia kara samfamiliano.



AEA Aferoj

Dum la pasintaj tri monatoj la estraro de AEA plejparte kunlaboris kun NZEA pri la organizado de la venonta kuna kongreso en Aŭklando, 10-18ajn de januaro 2020.

La kongresejo estos St Francis Retreat Centre – Auckland

Katalin Kováts kaj Stefan MacGill instruos.

Rigardu al la retejo de AEA por aktuala informo en la venontaj monatoj.

Kvar el la estraro, Sandor, Heather, Jonathan kaj Terry renkontiĝis en Sidnejo por prilabori la AEA arkivon. Vidu sekvan raporton

PRIARKIVAJ KUNVENOJ

10.00-11.00 24an Aprilo 2019

15.00-16.00 26an Aprilo 2019

Ĉeestis: Franciska Toubale, Heather Heldzingen, Jonathon Cooper, Sandor Horvath, Terry Manley

CELOJ DE LA GRUPO:

1. Konservi la kolekton.

Agnoskante ke la sperto de la grupo kaj la ejo por konservi la kolekton ne perfektas, ni klopodas en tiaj cirkonstancoj konservi ĝin kiel eble plej bone. E-Domo estas la plej daŭre havebla loko por konservi la arkivon. Jam esperantaĵoj malaperis pro forpreno de subteno de individuoj kaj organizoj, kiuj antaŭe konservis tiujn. Tio ne okazos en E-domo.

• Ni esploras kiel plej bone konservi la malnovajn raraĵojn en la kolekto.

• Ni rekomendas aĉeton de taŭgaj ujoj por kaj konservi kaj disponigi kolekterojn en sekuraj kondiĉoj.

2. Diskonigi kaj disponigi la enhavon al la Esperantistaro.

Plej efike oni uzus la interreton, sed tio dependas de rimedoj kaj homaj kaj teĥnikaj.

- registri la enhavon en retejo.
- foti kie taŭgas.
- skani raraĵojn.
- pruntedoni por studesploroj.

3. Propagandi pri ka per la enhavo de la arkivoj.

Uzi montraĵon de raraĵoj aŭ rete aŭ en taŭga ujo por propagandi.

4. Aldoni librojn, gazetojn, protokolojn, ktp kiuj ne aperas en la kolekto.

Trovi mankojn en la kolekto, speciale pri aŭstraliaĵoj, kaj peti la esperantistojn por donacoj. Akcepti raraĵojn.

5. Apartigi duoblaĵojn kiuj ne estas raraj kaj aŭ meti en bibliotekon ekster la arkivo aŭ, se tiuj estas superflujaj, oferti al kluboj aŭ individuoj en aŭ ekster Aŭstralio.

LABORO DE LA TRI TAGOJ

Plej multaj el la Dewey-numeritaj libroj estis surbretigitaj en ordo. Iuj nenumeritaj libroj estis metitaj super la ĝusta loko por venonta numerado kaj surbretigo.

Multaj el la fotoj estis fotitaj per poŝtelefono kaj enkomputiligitaj.

Komenco pri lokoj por Esperantaĵoj rilate al UEA - kongresoj, jarlibroj ktp.

Diskuto kaj lernado pri kiel funkcias la Dewey-sistemo.

Multaj el la binditaj ĵurnaloj estas jam sur bretoj.

Berlinaj muroj en Belfast

**DAVID RYAN
(WELLINGTON)**



Muro inter la du religioj

En februaro mia fratino kaj mi pasigis kelkajn tagojn en Nord-Irlando kaj Irlando. Ĉiuj scias pri longdaŭraj ‘problemoj’ en Nord-Irlando (aŭ ‘The Troubles’ kiel oni nomas ilin en la angla). Mi jam sciis pri la (fi)famaj murbildoj de Belfast, sed mi ege surpriziĝis kiam mi vidis murojn inter katolikaj kaj protestantaj kvartaloj.

Ni iris en ekskurso kaj nia ĉiĉerono, denaska Belfastano, klarigis al ni pri la historio de la problemoj kaj montris al ni la murojn. Estas 108 tiaj muroj en Nord-Irlando, plejparte en Belfast. Strange, oni nomas ilin ‘peace walls’ (pacmuroj). Nia ĉiĉerono klarigis ke la muroj estas tie por ‘protekti’. Oni ne volas ke najbaroj de religio A vizitu distrikton kie loĝas najbaroj de religio B, ĉar tiam povas okazi problemoj. Li diris al ni ke li iam ĉiĉeronis por turistoj

el Germanio kiuj demandis: ‘se vi provas grimpi la murojn, ĉu oni mortpafos vin?’. Falis la Berlina muro antaŭ 30 jaroj sed ankoraŭ ekzistas muroj en Belfast kaj, fakte, ili plialtiĝas!

Rigardu la fotojn kaj imagu ke vi loĝas en Belfast kun junaj infanoj. Kion ili pensas kiam ili forlasas la domon ĉiumatene por iri al la lernejo kaj ili vidas grandan muron inter ‘ni’ kaj ‘tiuj aliaj’?

Nia ĉiĉerono ankaŭ klarigis ke preskaŭ ĉiuj lernejoj en Belfast dividiĝas laŭ religio. Katolikaj infanoj devas iri al katolika lernejo, kaj protestantaj infanoj devas iri al protestanta lernejo. Pro tio, 18-jaraj junuloj povas forlasi lernejon kun amikoj nur de la sama religio! Ni demandis kio okazas se oni ne havas religion. Li respondis ke tio certe ne eblas ĉar aliaj homoj demandos: ‘Kiun lernejon vi ĉeestas? Kiun lernejon

ĉeestis viaj gepatroj? En kiu kvartalo vi loĝas?' ktp. Ofte familiaj nomoj povas sugesti religian devenon.

Ĉiutage oni aŭdas la diferencon. La dua plej granda urbo en Nord-Irlando nomiĝas Derry/Londonderry (laŭ mi, tiu urbo estas multfoje pli bela ol Belfast). La gaela nomo estas Daire, angligita al Derry. En la 17-a jarcento venis protestantoj el Anglio kaj Skotlando al la tiama Derry kaj, pro helpmono donacita de Londonanoj, oni ŝanĝis la nomon al Londonderry. Nuntempe, se Nord-Irlandano diras 'Londonderry', li/ŝi verŝajne estas protestanto, dum katolikoj diras nur 'Derry'. En trafikindikiloj, oni uzas la du nomojn sed ofte okazas ke iu forstrekis 'London' el 'Londonderry'.

Mi donu alian ekzemplon pri lingvo: mi laboras kun irlandano el Cork en suda Irlando. Iun tagon mi vidis ke li parolas kun alia irlanda virino en mia laborejo. Mi ne konis ŝin kaj mi poste demandis al la Corkano de kie venas

tiu virino. Li respondis ke ŝi diris al li ke ŝi estas 'nordano' ('from the north'). Tio volas diri ke ŝi devas esti katolika ĉar katolikoj ĝenerale ne rekonas Nord-Irlandon kiel apartan landon. Fakte, mi poste parolis kun la irlanda virino pri 'Derry Girls', Netflix-a programo kiu temas pri katolikaj junulinoj en Derry/Londonderry dum la 1990-aj jaroj kiam britaj soldatoj patrolis surstrate. Ŝi diris ke tiu programo fidele spegulas sian sperton.

Oni vidas multajn flagojn ĉie en Nord-Irlando, aŭ la flagon de Irlando aŭ la britan flagon. Ĉiuj Nord-Irlandanoj rajtas peti irlandan pasporton. Nia ĉiĉerono diris amuze ke protestanta amiko (tial, supozeble ne subtenanto de la plejparte katolika Irlando) fakte petis irlandan pasporton! Tio okazas nun pli kaj pli ofte pro timo pri Briteliro. Post mia vojaĝo, mi nun komprenas kial oni maltrankviliĝas pri Briteliro. Ni luis aŭtomobilon kaj ni veturis nur dek kilometrojn de Derry/Londonderry al

Murbildo en katolika kvartalo (vidu la flagon de Irlando)



Irlando. Tamen, ni vidis neniun oficialan landlimon. Ni sciis ke ni estas en Irlando nur kiam ni vidis trafikindikilojn en du lingvoj (gaela kaj angla) kaj en kilometroj anstataŭ mejloj. Homoj rajtas loĝi en unu lando kaj labori en la alia. Se estos landlimo kun pasportkontrolado post Briteliro, oni timas ke inter-landa fluo estos multe pli malfacila.

TAMEN, jen tre grava punkto kiun mi devas klarigi: mi parolas en ĉi tiu artikolo pri ĝeneralaj ekzemploj. Ĝenerale katolikoj ne ŝatas la fakton ke Nord-Irlando estas parto de la Unuiĝinta Reĝlando, dum protestantoj ĝenerale havas malsaman

opinion. Tamen, ne ĉiam! Certe estas videblaj konfliktoj, sed ne ĉiuj protestantoj kaj katolikoj kunvivas senpace. Nia ĉiĉerono diris ke la konflikta situacio iomete pliboniĝas. Mi demandis kio okazas se junulo en diskoteko vidas belan junulinon kun kiu li volas danci. La ĉiĉerono respondis ke la junulo nepre volos demandi pri la religio de la junulino aŭ, post konversacio, li almenaŭ divenos laŭ ŝia familia nomo aŭ doma adreso (ĉu ŝi loĝas en katolika aŭ protestanta kvartalo). Foje, se la junulino estas de malsama religio, la junulo simple forlasos ŝin. Imagu se li prezentos al siaj gepatroj junulinon de alia religio! Tamen, ankaŭ povas okazi ke la junulo kaj junulino kuniĝas. Malgraŭ religiaj malsamecoj, amo konkeras ĉion. Tial, mi devas ripeti: tio kion mi skribas ĉi tie ne rilatas al ĉiuj.

Por ni en Nov-Zelando kaj Aŭstralio estas malfacile kompreni tian situacion ĉar ni ĝuas relativan pacon sen grandaj problemoj inter religioj (kvankam ne ĉiam). Niaj landoj estas junaj. Male, la 'problemoj' en Nord-Irlando ekzistas ekde jarcentoj kaj neniu el Nord-Irlando aŭ Irlando povas kreski sen sperti la historion kiu influas la nunan situacion.



Murbildo en protestanta kvartalo (vidu la britan flagon)





Pri Leonardo da Vinci

**FRANCISKA TOUBALE
(MELBURNO)**

Pro tio ke 2019 estas la 500a jaro post la morto de la artisto, inĝeniero, en unu vorto humanisto de la Renesanco, Leonardo da Vinci, Italujo kaj Francujo organizas eventojn kaj ekspoziciojn por celebri la geniulon kaj por provi solvi misterojn ankoraŭ ne solvitajn.

Haroj de Leonardo estos inter la ekspoziciaĵoj. Kial tiuj haroj estas tiom gravaj? Italaj sciencistoj esperas ke dank' al DNA analizo ili sukcesos pruvi ke ne estas eraro koncerne la praulon de la 35 viroj de la provinco Toscani, kiuj estas konsiderataj posteuloj de la familio de Leonardo da Vinci.

Kvankam la preĝejo, kie la artisto estis entombigita en Cloux, nuntempe Clos-Lucé, apud la urbo Amboise, estis detruita dum la franca revolucio, ili esperas pruvi ankaŭ ke la restaĵoj vere apartenas al Leonardo.

Esperable ili sukcesos kondiĉe ke

... la haroj vere estas liaj!

Tio memorigas min pri la tempo kiam mi estis juna instruisto. Tiam ĉiun trimonatan periodon la gepatroj ricevis bultenon kun ordigo de la klasanoj laŭ la rezultoj en la ekzamenoj. Kiam la lernantoj skribis tekston por montri ke ili kaj komprenis la petitan temon kaj regas la lingvon, malfacilis decidi pri la nombro de poentoj. Tamen kelkaj instruistoj uzis duonon kaj kvaronon de poento por taksati la ekzercon. Finfine oni adiciis la poentojn de ĉiuj studobjektoj kaj averaĝis la sumon ĝis du ciferoj post la komo (aŭ la punkto). La rezulto de nepreciza taksado devis nepre esti tre preciza.

Nuntempe ne pli gravas kiu estas la unua laŭ la rezultoj en la klaso. Rivalenco malpliĝis kaj la etoso malstreĉiĝis. Ĉiu infano povas kompari sin al si mem kaj decidi ĉu li/ŝi progresis aŭ ne.

Recenzo: Amo inter Ruinoj de Trevor Steele

**DAVID RYAN
(WELLINGTON)**



Ĉi tiu 230-paĝa romano eldonita en 2016 temas pri Travis, juna aŭstralia ĵurnalisto kiu veturas al Sovetunio en 1990 por renkonti Esperantistan plumamikinon en Ukrainio. Li havas foton de ŝi en naĝkostumo kaj kun ŝi li atendas seksan rilaton ekde la tago de sia alveno, kaj ŝi ankaŭ kun li. Tamen, ŝi proponas ion, ni diru, nekutiman kaj strangan kaj Travis rapide decidas ke ŝi ne estas taŭga kunulino.

Samtempe, Virve estas juna 'blindige bela' ĵurnalisto/ĉiĉerono en Estonio, ankaŭ Esperantisto, kiu konas homon dum Esperanta evento kun kiu ŝi ankaŭ deziras trovi amon. Malfeliĉe ankaŭ por ŝi, longdaŭra amo ne eblas.

Ne surprize, Travis kaj Virve interkonatiĝas kaj ... ĉu ili trovos amon en fono de Sovetunio en tiu epoko 'en ruinoj'?

En ĉi tiu libro estas diversaj temoj.

Unue, Esperanto havas centran rolon. Travis alvenas al fremda lando sen paroli la lokan lingvon, sed li konatiĝas kun Esperantistoj kiuj bonvenigas kaj helpas lin. En nia movado, tio certe okazas. La fakto ke Travis, kiu ne parolas la rusan, konatiĝas kun homoj kiuj ne parolas la anglan montras ke Esperanto funkcias.

Due, amorado (seksumado) ankaŭ havas gravan rolon. Travis alvenas al Ukrainio preta por seksa rilato kun sia korespondamikino. Fakte, lia edzino en Aŭstralio jam forlasis lin kaj Travis pretas vojaĝi al la alia flanko

de la mondo por trovi novan amrilaton. Je la komenco kun la korespondamikino tio ne okazis, sed finfine Travis kaj Virve ĝuas seksan rilaton! Mi ne komprenas kial Trevor atendigis nin tiom. Preskaŭ en la lastaj paĝoj de la libro, Virve diras: '... ankaŭ ni virinoj povas lascivi al vira korpo ... Venu kaj ekcitu min!'. Finfine!

Trie, la tiamaj ekonomiaj kaj politikaj ŝanĝoj en Sovetunio estas grava temo. Por tiuj kiuj interesiĝas pri historio, Travis spertas problemojn dum la lasta jaro de Sovetunio, ekzemple starvicojn kaj mankon de manĝaĵoj, kaj poste li observas disfalon de Sovetunio kaj kreskantan naciismon en la baltaj landoj. Travis kaj Virve eĉ vizitas Moskvon kiam okazas puĉo en 1991.

Ĉi tiu rekomendinda libro estas facile legebla kaj verkita laŭ la kutima stilo de Trevor Steele.

La Limo de Memoro

DONALD ROGERS



Sciencistoj kiuj studis la DNA de Aborigenoj de Aŭstralio konkludis, ke la prauloj de la nuntempaj indiĝenoj migris en Aŭstralion antaŭ proksimume 65 000 jaroj. Ili restis apartaj de aliaj homoj dum tre longa tempo. Tial la Aborigenoj estas unu el la plej malnovaj vivantaj homgrupoj en la mondo kaj eble la plej malnova ekster Afriko. Ili eble havas la plej malnovan daŭran kulturon sur nia planedo. Geografia izoleco estas avantaĝo por kultura homogeneco.

Antaŭ 30 000 jaroj, okazis la lasta glaciepoko. Je tiu tempo, la marnivelo estis 120 metrojn sub la nuna nivelo kaj la klimato estis pli malvarma ol nun. La glacia maksimumo finiĝis antaŭ 18 000 jaroj; kaj poste, la marnivelo malrapide plialtiĝis. En Aŭstralio, ĝi atingis plimalpli la nunan nivelon antaŭ 7000 jaroj.

Patrick Nunn estas geografiisto kaj profesoro ĉe la Universitato de la

Sunbrila Marbordo (en Kvinslando, Aŭstralio). Li studis la legendojn de aborigenaj triboj kiuj loĝis longatempe apud la marbordo; kaj li eltrovis, ke ili rakontis ke la maro leviĝis kaj kovris pli ol antaŭe. Oni emis ne atenti tiajn parolajn historiojn, ĉar ili estas vestitaj per mitologiaj estaĵoj kaj magio. Eble la Aborigenoj brodis la rakontojn, por plifaciligi la parkeradon.

Ĉiu generacio volis doni al siaj posteuloj konsilon pri kiel travivi en la malfacila ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ iom da informo pri la historio de la tribo. Etnologoj proponis la ideon, ke Aborigenoj evoluigis metodojn por reteni tiajn informojn kaj transdoni ilin al la sekvaj generacioj. Sed kiel longe oni povas fari tion? Lujn rakontojn subtenis kantoj aŭ dancoj. Rokarto ankaŭ plifortigis la rakontojn, donante ŝlosilajn detalojn, eĉ mapojn, ekzemple

pri akvofontoj en dezerto.

Dum la glaciepoko, Aŭstralio estis pli seka, kaj oni forlasis la plej sekajn lokojn. Poste, la klimato iĝis malpli seka, do oni disvastiĝis denove tra la tuta lando.

Nunn studis la rakontojn de dudek unu aborigenaj grupoj ĉirkaŭ Aŭstralio. Ĉar intermiksiĝo inter la triboj okazis nur malmulte, li konkludis ke la diversaj rakontoj estas sendependaj. La tribanoj rakontas, ke la prauloj jam observis la marbordon kiam ĝi ankoraŭ estis pli fora ol post kiam la maro leviĝis kaj kovris parton de la tero. Geologoj konfirmis ke, antaŭ 18 000 jaroj, Aŭstralio estis unu trionon pli granda ol ĝi nun estas, kaj Tasmanio tiam estis parto de la ĉeflando. Ĉar la marnivelo ĉesis leviĝi antaŭ 7000 jaroj, la rakontoj (se veraj) devas esti daŭrintaj almenaŭ tiel longe.

Bretonujo kaj Kimrujo havas legendojn pri urboj kiuj malaperis kiam la maro pliprofundiĝis kaj kovris ilin. En Eŭropo, la marnivelo grade altiĝis post la glaciepoko, do legendoj tie povas esti pli junaj ol en Aŭstralio.

La tribo Klamath en Usono havas legendojn pri la erupcio de grandega vulkano, kiu staris kie nun troviĝas lago. Geologoj nomis ĝin Monto Mazama. Ili konfirmis, ke ĝi erupiis antaŭ ĉirkaŭ 7600 jaroj, kaj ke la tribo konservis tiun memoron ĝis la alveno de la eŭropanoj, kiuj registris ĝin skribe.

Ĉu ni havas aliron al rakontoj — eble skribitaj, eble nur parolaj — multe pli antikvaj ol ni suspektis? Nunn konkludis, ke jes.

En nia formala edukado, ni lernas per legado, ne per la rakontoj de niaj geavoj. Sed dum la plejmulto de la homa historio (ĉirkaŭ 200 000 jaroj), homoj ricevis sciojn nur per la parolataj vortoj de siaj

kunuloj. Ĉu ni supozas, ke oni skribis ĉiujn sciojn kiam niaj prauloj eksciis legi kaj skribi? Tio estas malverŝajna, ĉar, kiel montras ekzemploj en la libro de Nunn, iuj sciencaj malkovroj, kiujn ni rigardas novaj, fakte estas malnovaj.

En Aŭstralio, nordokcidenta Eŭropo, kaj Barato, homoj sukcese transdonis, dum centoj da generacioj, observojn pri la marinundo de marbordoj. Kion la scienco elmontris en la lastaj cent jaroj pri postglacia marleviĝo, tio konfirmas la observojn kiujn faris la antaŭuloj, ne inverse.

Estas same pri rakontoj pri vulkanaj erupcioj, aerolitaj kraŝoj, kaj la aperoj aŭ malaperoj de insuloj en oceanoj. Eble estas same pri nun formortintaj bestoj kiujn niaj antaŭuloj observis. En pli fruaj jaroj, la scienco povus esti gajninta el atento al tiaj rakontoj.

Ekzemple, Aborigenoj komprenis, ke senpluveco okazanta ĉiujn kelkajn jarojn kondukis al grandegaj arbarfajroj, sed ke, per pli ofta, intenca, forbrulado de brulebla materialo, oni povis plimildigi kaj malgrandigi la nature startigotajn fajrojn. Nuntempa ekologia mastrumado povus gajni per pli atenta studado pri aborigena praktikado. Ekzistas aliaj ekzemploj de parolaj scioj favorataj de lokaj homoj anstataŭ la (ofte netaŭgaj) konsiloj subtenataj de la moderna scienco: ekzemple, por ekkoni indikojn al baldaŭa cunamo aŭ erupcio en Indonezio aŭ la Salomona Insularo.

La scienco ebligas kredindigi multajn parolajn tradiciojn. Scioj pri marniveloj montras, ke la rakontoj pri marbordaj inundoj devas aĝi almenaŭ 7000 jarojn, kaj ke la rakontoj de la tribo Klamath pri la monto Mazama komenciĝis antaŭ ĉirkaŭ 7600 jaroj, ktp.


Do, kie troviĝas la limo de memoro – la tempopunkto preter kiu la homaro ne havas rektan informon? La respondo, Nunn konkludas, estas: antaŭ 10 ĝis 20 jarmiloj. La antikveco de iuj rakontoj estas malfacile taksebla.

Ŝajnas ke, tra la homa historio, alternis akiro kaj perdado de scioj. Se iu lerto perdas utilon, oni ĉesas rakonti pri ĝi kaj ĝi perdiĝas. Ekzemple, la unuaj

homoj kiuj migris en Aŭstralion devis transiri marspacojn ĝis 70 km largajn, sed modernaj Aborigenoj ne havas scion pri boatoj taŭgaj por tio.

Referenco

The Edge of Memory – Ancient Stories, Oral Tradition and the Post-Glacial World, Patrick Nunn, Bloomsbury Sigma, 2018.



Hamilton: iam forgesita urbo en norda Nov-Zelando



**DAVID RYAN
(WELLINGTON)**

Hamilton estas urbo je proksimume 125 kilometroj sude de Auckland en la norda insulo de Nov-Zelando. Lastatempe la urbo multe pligrandiĝis kaj ĝi estas nun la kvara plej granda urbo en Nov-Zelando (post Auckland, Wellington, kaj Christchurch) kun 160 000 enloĝantoj, universitato, kaj flughaveno (nur por enlandaj flugoj).

Iam Hamilton estis preskaŭ ŝerco (mi pardonpetas al niaj legantoj en Hamilton!). Ne estis kialoj por viziti aŭ loĝi en Hamilton. Tie okazis nenio. Kiam oni veturis de Wellington al Auckland, ne indis fari halton en Hamilton. Oni preskaŭ forgesis ke Hamilton ekzistas.

Tamen, lastatempe, tio ŝanĝiĝis. Hamilton situas meze de la tiel nomita 'ora triangulo' (Auckland – Hamilton – Tauranga) kie troviĝas preskaŭ duono de la nacia loĝantaro kaj granda parto de la nacia komercado/produktado. Nun pro altaj kostoj en Auckland, multaj Aucklandanoj translokiĝas al Hamilton kie ili trovas malpli kostajn domojn kaj laboreblecojn (pli kaj pli da kompanioj starigas oficejojn tie) aŭ kelkaj ankoraŭ veturas ĉiutage al Auckland. La registaro esploras eblecon de rapida trajno inter la du urboj.

Laŭ mi, Hamilton estas sufiĉe bela urbo. La rivero Waikato fluas tra la urbcentro kaj estas plaĉe promeni laŭ la riverbordo.

La publika ĝardeno estas tre vizitinda loko kun ĝardenetoj de diversaj stiloj, ekzemple japana ĝardeno. Mi ne ŝatas ĝardenumi kaj mi ne interesiĝas pri plantoj kaj arboj ktp., tamen, pasintan jaron mi vizitis Hamilton kaj ĉiuj rekomendis viziton al la publika ĝardeno. Nun mi tre entuziasmas pri tiu loko kaj mi rekomendegas ĝin: <https://hamiltongardens.co.nz/>

Ŝajnas ke Hamilton daŭre kreskos pro ĝia situo en la ora triangulo kaj, kompare kun Auckland, ĝi havas malpli altajn kostojn kaj pli trankvilan vivstilon.



Saga Land



Lastatempe mi legis interesan libron kun la titolo 'Saga Land' (pri Islando kaj la 'Sagaoj.'). En ĝi estis la sekvanta rakonto, kiun mi rekte tradukis. Ĝi venis el la norduloj en la mezepoko, sed NE estas sagao. (Oni scias, ĉar en ĝi tute mankas sekretaj murdoj, bataloj de venĝo, atakoj el embusko, bruligoj de familioj en iliaj domoj, kaj aliaj sangoverŝoj.)

Audun kaj la Blanka Urso

Antaŭ mil jaroj, en la nord-okcidento de Islando, vivis malriĉa farm-laboristo, nomita *Audun*.

Unu someron, ŝipo alvenis en la apuda haveno, kaj Audun povis doni al la kapitano utilan konsilon, kaj helpis lin vendi siajn varojn. Danke pro tiuj komplezoj, li proponis al Audun senkoston vojaĝon al Gronlando.

Audun vendis siajn ŝafojn, kaj donis al tiuloka farmisto sufiĉan monon por subteni sian patrinon per loĝado kaj nutraĵo dum tri jaroj. Tiam li surŝipiĝis, kaj forportiĝis al la okcidenta kolonio de Gronlando.

Inter la koloniistoj estis bestĉasisto nomite Erik, kiu kaptis polusan urson. Audun decidis aĉeti ĝin, kvankam ĝi kostos preskaŭ ĉiom de lia restanta mono. Li decidis donaci la imponan beston al Reĝo *Svein* de Danlando. Li aŭdis, ke tiu estas bona homo.

Survoje li kaj la urso devis vojaĝi tra Norvegujo; tie oni devigis lin aperi antaŭ Reĝo Harald, 'La Severa Reganto'. Tiu proponis aĉeti la urson per tre bona prezo. Audun ĝentile malakceptis, dirante ke li intencis donaci ĝin al Reĝo Svein de Danlando. Harald informis malplaĉite, ke li estas militante kun la Danoj; tamen li permesis al Audun pluen

**TOM O'GRADY
(KVINSLANDO)**

vojaĝi tra sia lando. Li nur insistis, ke revene Audun rakontu al li pri sia vojaĝo.

Audun kun la urso daŭrigis sian vojon suden ĝis Danlando; tie la lasto da lia mono elspeziĝis. Li devis almozpeti en la stratoj por nutri sin kaj la urson.

Li fine iris konsulti Aki, intendanto de Reĝo Svein. Li diris pri sia plano donaci la urson al la reĝo, kaj petis manĝaĵon por la besto, kiu estis preskaŭ mortanta pro malsato.

“Ne,” respondis Aki, “Mi ne donos al vi manĝaĵon. Sed mi aĉetos de vi duonon da la urso. Tiam vi havos monon por nutri ĝin.” Tio tre malplaĉis al Audun, sed kion alian li povus fari? Li devis akcepti.

Audun, Aki kaj la polusa urso iris vidi Reĝo Svein, sekvate de multaj homoj, ĝis la reĝa tablo.

“El kiu lando vi devenas?” demandis la reĝo.

“Mi estas Islandano,” diris Audun, “Mi aĉetis ĉi tiun urson en Gronlando per mia tuta havaĵo, intencante donaci ĝin al vi. Mi vidis Reĝon Haraldon, kiu permesis al mi trairi sian landon, eĉ kvankam li deziris la urson por si mem. Tiam mi renkontis ĉi tiun viron, Aki, kiu rifuzis helpi min, krom se mi vendus duonon da ĝi al li. Kaj nun la donaco estas malbonigita.”

Demandis la reĝo, “Ĉu ĉi tiu viro parolas la veron, Aki?”

“Jes, li faras, Lordo. Tial mi insistis, ke li retenu la alian duonon.”

Diris la reĝo, “Vi estis eta viro, Aki, kaj mi faris vin grandulo. Ĉu estis juste, ke vi malhelpis iun kiu elspezis ĉion, kion li havis, por ĉi tiu netakseble bona donaco? Eĉ nia malamiko, Reĝo Haraldo, lasis lin vojaĝi en paco. For el mia vido, Aki! - kaj lasu ĉi tiun landon

ĉiame!

Por vi, Audun, mi sentas la saman dankon, kvazaŭ vi donus la tutan urson.” Reĝo Svein invitis lin resti ĉe si dum ioma tempo. Tiam li konsentis patroni lin por pilgrimi al Romo.

Revenante de Romo, Audun tre malsaniĝis survoje, kaj lia mono elĉerpiĝis. Li fine reatingis Danlandon kiel maldika, malpuraĉa, ĉifona vagabondo. Li tro hontis por montri sin al la reĝo, precipe dum diservo, sed poste Svein rimarkis lin en malluma angulo.

“Vi ŝanĝiĝis,” li diris, premante ties manon. Li ordonis prepari banon por Audun, kaj donis al li la vestojn, kiun li mem portis dum Pasko. Li invitis lin resti ĉe si, kaj esti lia tasportanto. Sed Audun insistis, ke li devas reiri al Islando, ĉar lia tempo finiĝis; la mono kiun li provizis por sia patrino eluziĝis, kaj li tute ne volus pensi, ke al ŝi mankas.

“Vi devas esti vera bonŝanculo,” diris la reĝo, “Tio estis la sola motivo por foriri, kiu ne ofendus min.”

Reĝo Svein provizis Audun per ŝipo, ŝarĝita per bonaj varoj, kaj ankaŭ grandiozan brakringon, kiun li prenis de sia propra brako.

Tiam li adiaŭis la Islandanon.

Audun velis norden laŭ la bordo de Norvegujo, kaj haltis ĉe la kortumo de Reĝo Haraldo, por rakonti al li pri sia vojaĝo, kiel li promesis.

“Ĉu vi donis la urson al Reĝo Svein?” demandis Haraldo.

“Jes, Lordo, mi faris.”

“Kiel li repagis vin?”

“Nu, unue, per tio, ke li akceptis ĝin.”

“Ankaŭ mi farus tion same por vi! Kio alia?”

“Li donis manĝaĵon kaj saketon da arĝento, por ke mi povu pilgrimi al Romo.”

“Mi farus la samon ankaŭ. Ĉu estis io plu?”

“Li invitis min resti ĉe li, eĉ kvankam mi aspektis kiel vagabondo. Kaj li donis al mi la bonajn vestojn kiujn li mem portis dum Pasko.”

“Estas ne tiom rimarkinde trakti almozetanton tiel. Ankaŭ mi farus tion. Ĉu estis io alia?”

“Li donis belan ŝipon, ŝarĝitan per bonaj varoj, por ke mi reiru hejmon.”

“Tio estis ja malavara, sed mi estus farinta similan,” diris la reĝo. “Ĉu estis io ajn alia?”

“Li donis alian saketon da arĝento, por ke mi ne estu senmona se mia ŝipo pereos apud la Islanda bordo.”

“Nu tio estis ja vere malavara, kaj pli ol mi farus! Ĉu io plu?”

“Li donis al mi oran brakringon, diranta ke mi ne fordonu ĝin, krom se mi sentus ŝuldon al gravulo, kaj dezirus doni ĝin. Kaj nun mi donacas ĝin al vi, Lordo, ĉar vi povis mortigi min kaj prenu mian valoregan urson. Sed vi lasis min pluvojaĝi en paco. Mi ŝuldas ĉiom da mia fortune al vi.”

Reĝo Haraldo konfesis ke, kvankam ili ne estas amikoj, Reĝo Svein havas malmulte da egaluloj. Haraldo akceptis la brakringon, kaj ordonis, ke la ŝipo de Audun estu tre bone ekipata. Ankaŭ li donacis glavon kaj mantelon; ili estis ambaŭ trezoraĵoj, kvankam Haraldo diris ke ili estas nur donacetoj.

Tiusomere Audun revelis al Islando; tie ĉiuj konsentis, ke li estas viro de la plej bona fortune.

Multaj bonaj homoj estas liaj posteuloj.

Misaj modeloj de la angla gramatiko

DONALD ROGERS

De tempo al tempo mi rimarkas plendojn pri la kvalito de konsiloj pri la esperanta gramatiko. Mi volas rimarkigi ke oni povas ankaŭ juste kritiki konsilojn pri la angla gramatiko. Por ilustrati tiun opinion, konsideru diversajn difinojn de la angla vorto *transitive*.

La vortaro Oxford English Dictionary estas eble la plej aŭtoritata fonto de informo pri anglaj vortoj. Ĝi difinas tiel:

transitive... adjective

1. Grammar (of a verb or sense or use of a verb) able to take a direct object (expressed or implied), e.g. saw in *he saw the donkey*. The opposite of intransitive.

Traduko: **transitiva**... adjektivo

1. Fako gramatiko: (pri verbo aŭ senso de verbo aŭ uzo de verbo) kapabla preni rektan objekton (esprimitan aŭ implican), ekzemple *saw* [*vidis*] en *he saw the donkey* [*li vidis la azenon*]. La kontraŭo de netransitiva.

Ĉi tiu difino estas taŭga ĉar ĝi kovras ne nur la facilajn, simplajn ekzemplojn, sed la plejmulton. Ekzemple:

*why do cats **kill** mice?* / *kial katoj **mortigas** musojn* [transitiva]

*speed **kills** / rapideco **mortigas*** [transitiva]

La verbo *to kill* ĉiam estas transitiva. Por la netransitiva signifo oni devas uzi alian verbon, ekzemple:

*my mouse **died** / mia muso **mortis*** [netransitiva]

Tamen ekzistas aliaj difinoj. La retejo de Cambridge Dictionary (dictionary.cambridge.org/grammar/british-grammar/verb-patterns/) diras:

Some verbs always need an object. These are called transitive verbs. Some verbs never have an object. These are called intransitive verbs. Some verbs can be used with or without an object. These are called transitive (with an object) and intransitive (without an object) uses of the verbs.

Traduko: Iuj verboj ĉiam bezonas objekton. Ili nomiĝas transitivaj verboj. Iuj verboj neniam havas objekton. Ĉi tiuj nomiĝas netransitivaj verboj. Iuj verboj estas uzeblaj kun aŭ sen objekto. Ĉi tiuj nomiĝas transitivaj (kun objekto) kaj netransitivaj (sen objekto) uzoj de la verboj.

CD montras kelkajn ekzemplojn de verboj kiuj estas uzeblaj kun objekto (transitive) kaj sen objekto (intransitive).

*I just can't **eat** hot food – What time do you want to **eat**?*

*She **entered** the room looking nervous – Do not **enter**.*

*He **drives** a van for a delivery firm – I learnt to **drive** when I was twenty.*

Post la ekzemploj CD rimarkas:

In these examples, although one use has an object and the other does not, the meaning is more or less the same.

Traduko: en ĉi tiuj ekzemploj, kvankam unu uzo havas objekton kaj la alia ne, la signifo estas pli-malpli sama.

La rimarko ke la signifo estas pli-malpli sama estas stranga, ĉar la signifo estas tute sama. Kiel menciita en la difino de OED, objekto povas esti implica. Tio okazas en ĉi tiuj ekzemploj.

*What time do you want to **eat** [food] / Kiam vi volas **manĝi** [manĝaĵon]?*

*Do not **enter** [the room] / Ne **eniru** [la ĉambron]*

*I learnt to **drive** [a car] when I was twenty / Mi lernis **stiri** [aŭton] kiam mi havis dudek jarojn.*

Ĉiu ekzemplo enhavas transitivan verbon.

Alia tipo

Diversaj verboj havas kaj transitivan signifon kaj netransitivan signifon. Ĉe ili, kiam la verbo havas objekton, la subjekto faras la agon. Kiam objekto mankas, la ago okazas al la subjekto, do la verbo estas netransitiva (mediala). CD citas, inter aliaj:

*He **opened** the door and walked in – The door **opened** slowly.*

*Li **malfermis** la pordon kaj eniris – La pordo **malfermiĝis** malrapide.*

OED difinas la verbon *open* tiel:

open verb [with object]

1. move (a door or window) so as to leave a space allowing access and vision:

she opened the door and went in – ŝi malfermis la pordon kaj eniris (1)

[no object, in imperative] *'Open up' he said -- 'Malfermu' li diris* (2)

[no object] (of a door or window) be moved to leave space allowing access:

the door opened and a man came out – la pordo malfermiĝis kaj viro elvenis (3)

kaj kelkaj similaj difinoj por aliaj situacioj.

Ni rimarkas ke ekzemplo 1 kun objekto estas transitiva, ekzemplo 2 sen objekto estas transitiva, kaj ekzemplo 3 sen objekto estas netransitiva.

CD difinas la verbon *open* tiel:

1. to (cause to) begin:

I would like to open my talk by giving a brief background of the subject.

The Olympic Games open tomorrow

2. to move something to a position that is not closed, or to make something change to a position that is not closed

Could you open the window, please?

That door opens (out) onto the patio.

Kunmetante du signifojn (komenciĝi, komenci) CD kaŭzas iom da konfuzo.

Multaj malpli aŭtoritataj retejoj ekzistas. Ekzemple, Grammarly (<https://www.grammarly.com/blog/transitive-and-intransitive-verbs/>) diras:

To decide whether the verb is being used transitively or intransitively, all you need to do is determine whether the verb has an object.

Traduko: por decidi ĉu verbo estas uzata transitive aŭ netransitive, simple decidu ĉu la verbo havas objekton.

Tiu difino diras nenion pri implicaj objektoj.

Multaj verboj havas pli ol unu signifojn. La retejo <https://www.wordwebonline.com/en/DRIVE> listigas 22 signifojn por la angla verbo *to drive*. Pri veturiloj ĝi mencias (kun miaj tradukoj):

*he **drives** a bread truck / li **stiras** panan kamionon* [transitiva] aŭ *li **veturigas** panan kamionon* [transitiva]

*we **drove** to the university every morning / ni **stiris** al la universitato ĉiumatene*

[transitiva] aŭ ni **veturis** al la universitato ĉiumatene [netransitiva]

she **drove** me to school every day / ŝi **veturigas** min al la lernejo ĉiutage [transitiva]
my new truck **drives** well / mi nova kamiono **stiriĝas** bone [netransitiva] aŭ mia
nova kamiono **veturas** bone [netransitiva]

the car **drove** around the corner / la aŭto **veturis** laŭ la angulo [netransitiva]

we **drive** the motorway to work / ni **veturas** laŭ la aŭtovojo al la laborejo [netransitiva]
aŭ ni **veturas** la aŭtovojon al la laborejo [netransitiva]

Notu ke la esperanta vorto veturi havas du signifojn: 1. (p.p homo) Esti transportata de unu loko al alia per tiucela aparato aŭ maŝino; 2. (p.p. veturilo) translokiĝi. Tial ni povas uzi la verbojn *veturi* kaj *veturigi* por ĉiuj ses ekzemploj.

Ni vidas ke diversaj modeloj ekzistas por la anglaj verboj. La difino de OED pri transitive estas la plej taŭga por ni kiuj tradukas el la angla en Esperanton. Ni atentu la senobjektajn verbojn ĉar iuj estas netransitivaj kaj iuj estas transitivaj kun implica objekto. Tio montras ke ni ne povas analizi nur per la sintakso. Ankaŭ gravas la semantiko, la signifo de ĉiu verbo.



Fabelo

NEKONATO

Iam, iel, ial, Ego leviĝis en la tribo. El kie tiu venis estis mistero. Sed ekaperis Ego pli granda ol la vivo mem. Kaj ĉiuj miris ke tiel bela, inteligente ulo aliĝis al ilia tribo. La kapo de Ego estis iom ega sed ankaŭ belega, inteligentega. Do oni ne plendis.

Postnelonge Ego pensis ideegon kaj ĉiuj ege laŭdis, aplaŭdis. Ho la tribo baldaŭ superos ĉiujn en la regiono.

Oni pensis ke ĉiuj miris, ke ĉiuj laŭdis, sed iu ne kontentiĝis. Eto, nerimarkebla, ĉu nerimarkinda, kaŭris en angulo kun eta penso el eta menso. Kaj tiu penso ete elbuŝiĝis, "Kia Ego!"

Oni pensus ke neniu aŭdus sed la kapego de Ego ankaŭ havis orelegojn. Ho kia aŭdaco! Ego neniam spertis malaprobos.

Ego kriegis el buŝego al Eto, "Al kiu

vi parolas?"

Eto ŝrumpis ĝis grandeco pula sed tamen aŭdetigis "Vi."

La tero tremis. La aero vibregis ĝissurdige. "FOR!!"

Elreve tribanoj vekiĝis, komence flustrantaj, "Ne, ne, ne, ne." Kaj poste pli laŭte, "Ne, ne, ne, ne."

Ĝis ĉiu trovis sian voĉon, "NE, NE, NE, NE." Ili levis Eton en la aeron kaj portis tiun vilaĝen.

"Nepenseble!" pensis la vaka menso de Ego. Surgrunden tiu ŝrumpis kaj forserpentumis.

Samtempe plene je laŭdoj komencis kreski la kapeto de Eto. Ju pli da laŭdoj des pli granda ĝi kreskis ĝis oni ne plu rekonis ĝin.

En eta angulo rampis lumbriko ne povante elpensi ion ajn.

Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Esther Parris | **Secretary**

Committee Members:

Terry Manley, Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Ivan Pivac | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**
Dave Dewar | **Assistant Secretary**

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781



**KONGRESO DE
ESPERANTO**
kaj somerkursaro

aea.esperanto.org.au/kongreso

AŬKLANDO

10a-18a januaro 2020

